

STARTO

N-ro 1/2015 (254)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto Karel Vala

Virina tago en Esperanto-klubo Ŝumperk

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, P. Polnický, V. Türk

Tuopintoj kaj turnopunktoj

Ni esperantistoj ŝatas festojn. Mi aprezas tiun econ: ĝi montras ion gravan pri la spirito de la lingvo kaj movado, iajn vivoĝojon kaj dankemon, kiuj certe helpis al ni travivi la lastan defioplenan jarcenton.

Tial estas taŭge malfermi ĉi tiujn jarmalfermajn pensojn per aludo al la 100-a Universala Kongreso, kiu post nur kelkaj monatoj bonvenigos homojn el la tuta mondo al Lillo, Francio. Tiu gaja evento estos ankaŭ la pinto de la Jaro Montevideo 60, okazo por prifleri diversmaniere nian sesdekjaran kunlaboron kun Unesko. Ambaŭrilate, ni havas multajn kaŭzojn por ĝojo, multajn kaŭzojn por dankemo. Pensu nur pri tio, kiom kreskis nia kulturo dum tiuj jardekoj, aŭ kiom pli tutmonda estas nia komunumo, ol ĝi estis en 1905!

Temas do pri festa jaro, jaro animaltiga, kiun bele simbolas la Lilla tuopinto en la kongresa emblemo. Sed atendas nin ankaŭ laboro, ĉar ni troviĝas ankoraŭ longe for de niaj revoj kaj aspiroj. Gravas ne nur agnoski la atingitajn pintojn, sed ankaŭ elserĉi la eblajn turnopunktojn, kiuj povus malfermi novajn ŝancojn por niaj lingvo kaj movado.

Tiurilate indas noti, ke 2015 estos grava jaro por Unuiĝintaj Nacioj, kiam diversaj plurjaraj streboj (pri edukado, pri evoluigo, pri klimatsanĝo) atingos sian kulminon. Interalie, la Jarmilaj Evoluigaj Celoj atingos sian limdaton kaj bezonos renovigon. Temas pri kolekto de la ĉefaj prioritatoj por la UN-sistemo kiel tuto; inter la Jarmilaj Celoj troviĝas i.a. la universaligo de baza edukado, la reduktado de infanaj mortoj kaj la provizado per pura trinkakvo. En la lastaj jaroj, la neceso interkonsenti pri novaj celoj post 2015 spronis vastan debaton pri la prioritataj direktoj de la evoluiga politiko, en kiu rolas konsideroj pri homoj rajtoj, daŭripovo, enurbiĝo, migrado, kaj aliaj nuntempaj tendencoj.

Se ni rigardus dudek jarojn antaŭen, kiel oni klopodas fari nun en UN, kion ni ŝatus vidi? Sendube mondon, en kiu oni pli serioze traktas la defiojn de multlingveco. Mondon, en kiu Esperanto estas pli vaste rigardata kiel valora rimedo por kunlaboro kaj interkompreniĝo, kiel vojo al pli egalecaj kaj solidaraj rilatoj inter homoj el malsamaj landoj kaj kulturoj. Mondon, en kiu ni nombras la membrojn de UEA ne per miloj sed per centmiloj.

Tiuj celoj estas interligitaj. Ne eblas atingi la lastan, sen progresi pri la aliaj. Tial UEA tiel insistas en la rondoj de UN pri lingvaj rajtoj, pri lingva egaleco, pri la protektado de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj. Organizo, kiu flankenmetas tiajn demandojn, certe ne estos preta serioze konsideri la rolon de nia lingvo en la streboj por pli justa mondo.

Nu, se ni rigardas la nunan debaton pri evoluigo, ne tuj troviĝas multaj kialoj por optimismo. Lingvo preskaŭ tute mankas kiel temo en la preparadokumentoj por la evoluigaj celoj post 2015. La fakto, ke tiuj dokumentoj aperis nur en la angla, estas plia signo de tiu malzorgo pri lingvaj demandoj. En la tuta kompleksa sistemo de UN, kun dekoj da diversfakaj branĉoj kaj organoj, ŝajne troviĝas neniu memkonscia ĉampiono de la multlingvismo, nek pledantoj por kohera lingvopolitiko bazita sur klaraj principoj kaj realisma analizo.

Aliflanke, disvastiĝis la konscio, ke la ĝisnunaj evoluigaj modeloj estas mankohavaj, ĝuste ĉar ili ne traktas la profundajn radikojn de socia malegaleco, sed koncentriĝas al simptomoj (kiel ekzemple la manko de pura akvo, kiu ja estas ege grava, sed rezultas el historie kreskintaj strukturoj de ekonomia kaj ekologia maljusteco). Tiaj kritikoj venas ne nur de akademiaj esploristoj kaj funkciuloj de UN, sed ankaŭ de homoj en influaj pozicioj en la internacia politiko, ĉar ili vidas kion diras la raportoj kaj statistikoj. Do, kreskas la preteco konsideri sistemajn, strukturajn ŝanĝojn, eĉ se tio ankoraŭ ne etendiĝis al la lingva kampo.

Por plene partopreni en tiaj diskutoj, tamen, ni esperantistoj devas esti simile malfermitaj al novaj ideoj, novaj perspektivoj. Se ni havas ion valoran kaj unikan por kontribui pri la lingva dimensio de la socia evoluo, aliaj movadoj povas nemalhaveble kontribui pri aliaj dimensioj. Ni ne imagu, ke "la lingva problemo" povos iam solviĝi aparte de aliaj gravaj demandoj. Fakte ne ekzistas unusola "lingva problemo", sed lingvaj aspektoj de tre multaj diversaj sociaj problemoj, al kiuj ni kiel esperantistoj povas rilati kun intereso kaj simpatio, sed kiujn Esperanto sola ne povas solvi.

Do, kvankam mi komencis ĉi tiun mesaĝon parolante pri fiero, mi nun volas substreki la ekvilibriĝan valoron de humileco. Ni havu memfidon, sed ne tro. Ni ne timu prezenti Esperanton kiel valoran rimedon por homa komunikado, kunlaboro kaj interkompreniĝo; aliflanke ni komprenu, ke ĝi devas trovi sian lokon en pli vasta strebaro por daŭripova estonteco. Se ni predikas dialogon, ni praktiku dialogon. Se ni serĉas la subtenon de aliaj, ni estu pretaj reciproke subteni ilin.

Kie troviĝas la neŭtraleco en ĉio ĉi? Nu, tro ofte oni pensas, ke por esti neŭtrala oni devas agi tute sendepende kaj memcentre, kiel homo kun alta muro ĉirkaŭ sia domo, aŭ firmao, kiu okupiĝas nur pri la propra profito. Sed ni prefere konduku kiel homo, kiu volas teni bonajn rilatojn kun ĉiuj najbaroj, kaj kiu investas parton de sia laboro por la bonfarto de la komunumo. Nuntempe, tiu komunumo tre evidente devas inkluzivi la naturon en ĝia plena diverseco. Do, al la homaj rajtoj kiel bazo por nia agado, ni devas hodiaŭ aldoni ekologian justecon, kune kun la zamenhofaj valoroj de toleremo, respekto kaj inkluziveco.

En tiu spirito, mi deziras al ĉiuj esperantistoj justan kaj dialogo-plenan novan jaron!

Mark Fettes

Montevideo antaŭ 60 jaroj

La 10-an de decembro 1954 Unesko akceptis rezolucion favoran al Esperanto, sed post malfacila traktado.

Ivo Lapenna laŭregule aliĝis al parolado duonhora, sed anstataŭ li ricevis vorton iu dano, kiu parolis kontraŭ Esperanto, mokis ĝin kaj liajn uzantojn. D-ro Lapenna ricevis nur 5 minutojn, dum kiuj li diris, ke estas bato al demokratio, se anstataŭ ĝustatempa aliĝinto ricevas la vorton tiu, kiu aliĝis lastmomente, ke la dana parolanto mokis esperantistojn kiel Tolstoj, Tagore, Barbusse, kaj ke kelkajn metrojn de la salono estas ekspozicio de Esperanto-libroj, tradukitaj kaj originalaj, kie ĉiu povas konvikiĝi, ke Esperanto ne estas lingvo primitiva. Sekvan tagon skribis la urugvajaj ĵurnaloj pri skandalo ĉe Unesko kaj kiam okazis balotado pri la rezolucio, plejparto de hontantaj landaj reprezentantoj voĉdonis por.

UEA volas festi tiun okazaĵon per aranĝoj, vidu la sekvan paĝon. Sed unue ni rememoru la rezolucion mem.

Montevidea Rezolucio de Unesko

*IV.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto:

*IV.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

*IV.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

*IV.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

*IV.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

Rezolute UNESKO, 1954

IV.1.4.422 Generální konference, po diskuzi o Zprávě Generálního direktora o Mezinárodní petici ve prospěch esperanta;

IV.1.4.4221 Bere na vědomí výsledky dosažené esperantem na poli mezinárodní duchovní výměny a pro sblížení národů světa;

IV.1.4.4222 Uznává, že tyto výsledky odpovídají cílům a ideálům UNESCO;

IV.1.4.4223 Bere na vědomí, že mnohé členské státy informovaly o své připravenosti zavést nebo rozšířit výuku esperanta ve svých školách nebo vyšších výchovných zařízeních, a prosí tyto členské státy informovat Generálního direktora o výsledcích dosažených na tomto poli;

IV.1.4.4224 Pověřuje Generálního direktora sledovat vývoj v aplikaci esperanta ve vědě, výchově a kultuře a spolupracovat za tímto účelem se Světovým esperantským svazem v záležitostech týkajících se obou organizací.

Generální konference UNESCO, Montevideo, 1954.

Jaro „Montevideo 60”

La komencaj tagoj de la Nova Jaro estas natura momento por sumigi la faritaĵojn de la jaro pasinta kaj plani eventojn de la jaro komenciĝanta.

La kampanjo Montevideo 60 estis inaŭgurita en septembro 2014. Nun venis tempo por analizi, kiuj eventoj kadre de la Jaro M60 okazis ĉe vi lastjare. Kion alportis la proponita de UEA retrorigardo al viaj plej gravaj atingiĝoj, al via kontribuo al la originala aŭ tradukita E-literaturo, al alispeca kultura kaj scienca agado, lingvoinstruado, utiligo de amas-komunikiloj kaj simile?

La jarkomenco estas taŭga momento por plani aŭ verkonformigi planojn pri eventoj de 2015. Do kiajn aranĝojn vi antaŭvidas por la Montevideo-jaro, kies kulmino estos sendube la 100-a Universala Kongreso en Lillo, sed kiu povos ampleksi pliajn eventojn kaj projektojn ĝis la fino de la kuranta jaro? Ĉu eblas marki la Jaron per speciala seminario, kultura programo, kurso aŭ preleg(ar)o, aŭ per eldono de artikol-serio, retpaĝaro, libro aŭ podkasto? Ĉu eblas kunmeti intervjuojn pri la lastaj 60 jaroj kun esperantistaj veteranoj kaj aktualaj gvidantoj? Tio estas nur kelkaj ideoj.



Amikeco trans limoj

Antaŭ ni tuta jaro por festi la atingojn de Esperanto sur la kampoj de edukado,

scienco, kulturo. La jaro, en kiu ni povas ankaŭ en la jubilea etoso de la

Jaro M60 referenci al niaj tradicioj.

Unu el la plej malnovaj estas Universala Kongreso de Esperanto. Jam 47 jarojn havas la tradicio de la Semajno de Internacia Amikeco, kiun ni solenos dum la lasta plena semajno de proksimiĝanta februaro. Tio estas la plej proksima evento por fiere soleni ĝin kadre de la Jaro Montevideo 60 laŭ ĝia devizo „Amikeco trans limoj”. Ĝi kerne ne ŝanĝiĝis, kvankam ŝanĝiĝis diametre la komunikmaniero en la hodiaŭa mondo. Klopodu, ke ĝia grafika simbolo de du reciproke interpremantaj manoj aperu ne tiom sur poŝtkartoj, sed tra la Interreto en viaj blogoj, TTT-paĝoj, retmesaĝoj ne sole cele esperantistojn. En sia rezolucio el 1954 Unesko notis i.a. „la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo”. Semajno de Internacia Amikeco celanta komence la E-komunumon kadre de la Kampanjo Montevideo 60 sendube povas ricevi plian elanon dum klubaj, grupaj renkontiĝoj malfermiĝante al la ekstera publiko, al alinacianoj en lokaj medioj tiel pruvante al la ekstera mondo niajn daŭrajn klopodojn por efektiva proksimigo de la popoloj de la mondo. Pri via kontribuo tiukampe kadre de la Jaro Montevideo nepre informu.

Atendante vian respondon mi restas kunlaboreme via.

Kun koraj salutoj,
Barbara Pietrzak, UEA-

estrarano pri la Jaro „Montevideo 60”

Teo kaj amo

Konkurson de Ĉina Radio Internacia pri la temo *Teo kaj amo* partoprenis 43 mallongaj filmetoj el diversaj landoj.

Inter la unuaj 10 plej bonaj finiĝis slovaka filmeto **Rememoro** pri la ĉeĥa kastelo Bartošovice, en kiu esperantlingve rolis infanoj de la loka lernejo kaj subtenis ĝin vilaĝa administrejo.

En la dua-premia dekduo estis nenia nia reprezentanto, sed en la tria-premia dudeko aperis slovaka filmeto **Teejo de bonaj homoj** registrita dum Somera Esperanto-Studado en Nitra kaj **Teo kaj amo de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy**. En la Ottendorfer-domo nia muzeo najbaras kun teejo, kiun ĉiu devas trairi por enpaŝi en la muzeon, do la rilato inter Esperanto kaj teo sin proponis mem. La klubanoj prezentas la muzeon, la teejon kaj ankaŭ internacian ludon geokaŝado, kiu same amikigas homojn en la mondo kaj kies unu geokaŝujo nun troviĝas ĉe la muzea domo. La serĉantoj tiamaniere povas ekscii pri la muzeo kaj Esperanto.

Ĉiujn 43 filmetojn oni povas vidi aŭ elŝuti ĉi tie:

<http://esperanto.cri.cn/1621/2015/02/06/165s172485.htm>

Specialan premion por plej potenciala reĝisoro akiris irana filmeto *La plej juna krimulo de la mondo*, por originala kanto litova-hispana-argentina filmo *Koloroj del' mondo* kaj por terkultura dokumento ĉinia-turkia filmo *Teo kaj amo*.


Ĝis la 31-a de marto oni povas voĉdoni por la premio de la spektantoj.



Gastronomia vortaro ĉeĥa-esperanta

Marie Ribasová – Margit Turková

Laŭ instigo de lingvaj seminarioj en Skokovy la aŭtorinoj dum pluraj jaroj preparis la gastronomian terminaron, konsultante diversajn fontojn (ekz. germanan-esperantan EBVDuden-vortaron) kaj konsilantojn (Zdeněk Pluhař, Jan Werner).



Estiĝis 33-paĝa verketo de formato A5 dividita laŭ ĉapitroj: preparo de manĝoj, vazaro kaj kuirhelpiloj, krudaĵoj, manĝoj, trinkaĵoj.

La krudaĵoj estas dividitaj je bazaj krudaĵoj, legumenoj kaj cerealoj, legomoj kaj fruktoj, spicaj kaj aromaj herboj.

Kompreneble la plej ampleksan parton okupas la manĝoj mem: antaŭmanĝoj kaj salatoj, supoj, saŭcoj, viandaj manĝoj, senviandaĵ manĝoj, garnaĵoj, farunaĵoj kaj desertoj.

Ne mankas desegnoj de bestaj korpoj kun nomoj de unuopaj viando-partoj kaj tabelo de nocio-sistemo de knedbuloj laŭ la ĉeĥia kuirarto.

Pluajn informojn petu ĉe Margit Turková margit.turkova@email.cz.

-mm-

Situace kolem sjezdu v r. 2015

Vážení členové ČES,

jak jste si mohli přečíst či slyšeli na sjezdu v Prostějově, je třeba letos přijmout nové stanovy, které budou v souladu s novým občanským zákoníkem (dále NOZ) a zároveň nám nebudou komplikovat život. Nutností v první řadě bude upravit usnášenischopnost, protože bez úpravy stanov by byla vždy třeba účast většiny členů, tj. cca 280, což není reálné.

Neznáme jiné východisko, než při jedné z akcí „pořádat“ řádný sjezd (jelikož pouze sjezd může měnit stanovy) vč. pozvánky na něj, přičemž tento sjezd nebude usnášenischopný a bude předčasně ukončen. Jen takto totiž do 6 týdnů po něm můžeme zorganizovat náhradní sjezd, který se může usnášet za jakéhokoliv počtu přítomných a schválit tak stanovy, které do budoucna podmínku většiny zruší.

Výbor tak rozhodl, že řádný (předpokládáme však, že předčasně po 20 min. ukončený) sjezd se bude konat současně s verniksází výstavy „*S esperantem kolem světa*“ ve Svitavách 26.-27.9.2015, zatímco náhradním (avšak reálným) sjezdem bude víkend 6.-8.11.2015 (nyní pod názvem Kulturní kon-

ference; místo konání je v době uzávěrky Starta předmětem jednání a bude včas upřesněno).

Ačkoliv dopředu nelze nic předjímat a naší povinností bude náhradní sjezd oficiálně vyhlásit až do 10 dnů po sjezdu řádném (a do té doby vás zvát jen na Kulturní konferenci), první informace dostáváte již v tomto čísle vč. nástinu programu, který je zejména pro sobotní dopoledne zatím volný, protože zde počítáme se zařazením pracovní části náhradního sjezdu, tj. zprávy o činnosti, projednání a schválení nových stanov, volební komise pro r. 2016, apod.

Omlouvám se za těžkopádnost řešení, ale jiné nám zřejmě NOZ neumožňuje, a proto věřím ve vaše pochopení.

V případě jakýchkoliv dotazů mi prosím volejte či pište na kontakty, jež jsou uvedeny na rubu titulní stránky.

Vladimír Dvořák, předseda ČES

Inaŭguro de ekspozicio
**Kun Esperanto ĉirkaŭ
la mondo**
Esperanto-muzeo
Svitavy
26.-27.9.2015

ĈEA-komitato elkore invitas vin al



Kultura Konferenco de Ĉeĥa Esperanto- Asocio

6.-8.11.2015

Supozata programo:

labortraktado, prelegetoj kaj diskutoj en laborgrupoj, muzikaj kaj literaturaj prezentoj, filmprojekciado, dancvespero, komuna muzikumado, urbotrigrardo kaj vizito de elektitaj memorindaĵoj k.a.

Proponoj pri viaj eblaj kontribuoj estas bonvena!

ATENTON! Kaze ke la septembra ĈEA-kongreso estos finita pro nesufiĉa partopreno (laŭ la preskribo de la nova civitanleĝaro necesas pli ol duono de la tuta membraro, kio ne realas), tiu ĉi konferenco devos esti proklamita kiel rezerva kongreso kaj la sabata antaŭtagmeza programo estos dediĉita al labortraktado inkl. precipe necesan alprenon de la nova statuto. ĈEA-membroj bv. legi ĉeĥlingvan klarigon sur la paĝo 8. Dankon por via komprenemo.

Okazloko estas en la tempo de finredakto de tiu ĉi numero ankoraŭ en stato de traktado. Fina rezulto aperos dum la monato aprilo en Kalendaro de aranĝoj en la ĈEA-retejo www.esperanto.cz.

Detalaj informoj kaj aliĝilo kun prezoj aperos en la 2-a numero de Starto ĝis fino de junio. Ĉiujaze bv. noti jam nun la daton en viaj kalendaroj! Ni antaŭĝojas sincere vian ĉeeston!

*Estimplene
membroj de ĈEA-komitato*



RENKONTIĜO EN PACOV (Regiono Vysočina) la 28-an de aprilo 2015

Escepte marde, okaze de instalo de la migra ekspozicio "*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*" en la kastela preĝejo en Pacov.

Urbopromeno, komuna tagmanĝo kun akompana programo (interparolado kun d-ro Max Kašparů, kantado k.a.), je la 14:00 inaŭguro de la ekspozicio, vizito de la Urba Muzeo en la kastelo; kroma surprizo eblas ☺!

Info: Milada Zemanová,
zemamka@seznam.cz
tel. 606 617319

Výsledek hospodaření ČES za rok 2014, plán na rok 2015
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).

| Příjmy | rok 2014 | plán 2015 | Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2014 | |
|---------------------------------|----------------|----------------|---|----------------|
| Příspěvky na běžný rok | 21 690 | 23 000 | peněžní prostředky | |
| Příspěvky dobrovolné | 10 110 | 14 000 | pokladna korunová | 9 264 |
| Příspěvky na budoucí rok | 24 774 | 25 000 | ceniny | 0 |
| Dary členů | 4 200 | 13 000 | postkonto | 2 048 |
| Dary nečlenů | 0 | 0 | účet Fio | 100 |
| Dotace | 0 | 0 | účet Fio spořicí | 245 780 |
| Starto předplatné | 0 | 1 000 | peníze celkem | 257 192 |
| Konference a sjezdy | 56 637 | 60 000 | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>28 580</i> |
| Činnost klubů a sekcí bez PS | 0 | 5 000 | investice | |
| Muzeum | 0 | 0 | podílové listy | 191 023 |
| Libroservo | 7 179 | 8 000 | investice celkem | 191 023 |
| Kurzy esperanta | 0 | 4 000 | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>6 037</i> |
| Příspěvky UEA ind. běžný rok | 6 976 | 7 000 | pohledávky | |
| Příspěvky UEA ind. budoucí rok | 35 277 | 40 000 | UEA subkonto | 155 208 |
| Platby UK na běžný rok | 0 | 4 000 | | 0 |
| Platby UK na budoucí rok | 133 110 | 120 000 | pohledávky celkem | 155 208 |
| Platby ILEI a pedagog. komise | 750 | 750 | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>108 452</i> |
| Úroky z účtů | 130 | 50 | ostatní majetek ČES | |
| Virtuální adresa | 0 | 200 | vybavení muzea v ceně pořízen | 145 246 |
| | | | knihy v libroservu (odhad) | 33 700 |
| Pohledávky u klubů a sekcí s PS | 2 400 | 0 | | |
| Příjmy celkem | 303 233 | 325 000 | ostatní majetek ČES celkem | 178 946 |
| | | | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>8 014</i> |
| Výdaje | rok 2014 | plán 2015 | závazky | |
| Starto tisk | 21 658 | 20 400 | platby pro UEA | 7 680 |
| Starto distribuce | 12 781 | 12 800 | platby pro UK | 133 110 |
| Konference a sjezdy | 51 450 | 55 000 | závazky celkem | 140 790 |
| Činnost klubů a sekcí bez PS | 5 495 | 5 000 | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>130 540</i> |
| Administrativa, kancel. pořeby | 2 188 | 2 500 | účelově vázané prostředky | |
| Jízdné funkcionáři | 4 421 | 5 000 | fond Tilio | 27 392 |
| Přísp. na stravné za schůze | 550 | 700 | fond ediční | 12 660 |
| Muzeum | 9 613 | 20 000 | fond Cigno | 34 697 |
| Libroservo nákup zboží | 11 908 | 8 000 | kluby a sekce bez právní subj. | 77 412 |
| Libroservo poštovné a balné | 523 | 600 | celkem | 152 161 |
| Kurzy esperanta | 86 | 200 | <i>změna vůči 31.12.2013</i> | <i>-5 560</i> |
| Příspěvky UEA ind. běžný rok | 10 476 | 10 000 | | |
| Příspěvky UEA ind. budoucí rok | 28 647 | 40 000 | | |
| Platby UK v běžném roce | 5 700 | 137 100 | | |
| Platby UK na budoucí rok | 0 | 120 000 | | |
| Platby ILEI a pedagog. komise | 823 | 800 | | |
| Kolektivní členství v UEA | 990 | 1 000 | | |
| Kolektivní členství v EEU | 1 371 | 1 400 | | |
| Blahopřání, kondolence | 478 | 1 000 | | |
| Poplatky bance | 61 | 50 | | |
| | | | | |
| Výdaje celkem | 169 219 | 441 550 | | |

Pozn:

Do majetku muzea jsme nakoupili 2 regály. Vysoké závazky vůči UEA za čl. a UK jsou způsobené tím, že si UEA k 31.12.2014 ještě nestrhl z našeho subkonta u UEA poukázané a včas nahlášené platby našich členů. Přijaté platby UK pro letošní rok jsou tedy v plánu výdajů na rok 2015.

PRI ESPERANTO EN ĈEĤA RADIO

La 19-an de decembro 2015 en la Ĉeĥa Radio PLUS en vaste sekvata programo *Radioforum* okazis unuhora diskuto pri la temo "*Ĉu Esperanto havas sencon, se ĉie estas la angla lingvo?*", kies ĉefa intervjuato estis Tomáš Břicháček, prezidanto de la Klubo de esperantistoj en Prago. Gastoj ĉetelefonaj estis Marek Blahuš kaj David Gruber. En la programon kontribuis ankaŭ aŭskultantoj.

Malgraŭ skeptika provoka demando la programo fine realiĝis sufiĉe favore al Esperanto.

S-ino Helena Tlachová, kiu gvidas Esperanto-rondeton en Šumice ĉe Uher-ský Brod, sukcesis en la projekto "*Ni plenumas revojn al senioroj*" kaj ricevis subvencion por vojaĝo al Nepalo, kie helpis realigi ŝian restadon lokaj esperantistoj. Pri ŝiaj travivaĵoj kaj pri utileco de Esperanto dum vojaĝado raportis en ampleksa intervjuo Radio Brno en la programo *Apetyt* (15.1.2015).

27.2.2015, kadre de la programo *Křížem krázem* Radio Ostrava dissendis programon dediĉitan al Esperantomonumento en Ostrava, sed ankaŭ al historio kaj nuntempo de la regiona Esperanto-movado. La ĉefa gasto estis Jaroslav Suchánek, membro de la loka klubo kaj eksa ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio.

Ĉiujn radioelsendojn eblas aŭskulti pere de ligiloj en Aktualajfoj en www.esperanto.cz!

Má esperanto smysl, když je všude angličtina ?

Samotná otázka mi v základním pojetí nedává smysl. Je obsahově podobná otázkám typu „...*má smysl kupovat si jízdní kolo, když se všude dostaneš veřejnou dopravou?*“ nebo „...*má smysl pěstovat si na zahrádce vlastní zeleninu, když si všechno můžeš koupit v supermarketu?*“ Eventuálně „...*má smysl chovat poštovní holuby, když existuje pošta a internet?*“

Ona otázka odpovídá duchu silně zmaterializované doby. Pěstuj ten jazyk, který ti umožní byznys, věnuj se jazyku, který ti pomůže společensky vystoupat výš, dělej to, co ti umožní prosperovat. Pokud budeme takto materialisticky uvažovat, je naše esperanto vskutku zbytečné. Ale ono je více než jazyk.

Vraťme se k onomu porovnání s bicyklem, zeleninou a poštovními holuby. Nevím o tom, že existují kluby a společenství lidí, kteří cestují autobusem, ale společenství cyklistů existují. Nevím, že by existovaly kluby přátel kupujících zeleninu v supermarketech, ale svazy a spolky zahrádkářů existují. Nevím o žádné společenské organizaci lidí, kteří fandí České poště, ale kluby chovatelů poštovních holubů jsou početné.

Při propagaci esperanta bychom měli hovořit především o oné, pro svět sekundární rovině. Vždyť právě ona je ve skutečnosti primární.

Diskusní příspěvek dr. Maxe Kašparů ke stejnojmennému pořadu v pražském rozhlase 19.12.2014; www.esperanto.cz

La jubilea 10-a SABLA PRINTEMPO

23.-26.4.2015 en Skokovy

Jam la kvaran fojon okazos paralele kun al Lingva Seminario en la pensiono ESPERO en Bohemia Paradizo. La ĉefa temo estos denove

„SONREGISTRADO“

– trejnado pri realigo de voĉregistraĵoj (de tekstoj por lingvokursoj, beletro kaj prelegoj) kaj de muziko en komputilo en la programo Audacity. Eblas ankaŭ por absolutaj komencantoj!

Ĵaŭde vespere "Aktualaĵoj pri Esperanto en Interreto", vendrede antaŭtagmeze seminario

„MALKOVRU VIAN VOĈON“

sabate kaj dimanĉe individuaj interesitoj realigos sonregistraĵojn, en cetera tempo eblas partopreni lingvan konversacion, komunajn posttagmezajn ekskursojn kaj amuzvesperojn.



Restadkotizo 3x420,- CZK (por loĝado kaj plena pensio) + 150,- CZK por organiza/programa kontribuo. Familieca etoso, senbariera medio, loĝigo en 2–3 (escepte maks.4) litaj ĉambroj (kun lavujo; duŝejoj / necesejoj surkoridore).

Ebleco de ripozo en la ĝardeno, kuracaj proceduroj, tablotenis, prunteblo de bicikloj.

Informoj kaj aliĝoj: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, pavla.dvorakova@esperanto.cz

RENKONTIĜO DE KATOLIKA SEKCIO DE ĈEA

26.-28.6.2015

en Svatá Hora ĉe Příbram

PROGRAMO: Partopreno en matenaj sanktaj mesoj kaj vesperaj rozariaj preĝoj en la baziliko, sabate antaŭtagmeze trarigardo de la urbo Příbram, sabate ekde la 13-a horo trarigardo de la unika pilgrimareo Svatá Hora (*Sankta Monto*), prelego kaj diskuto kun prezidanto de la sekcio d-ro Max Kašparů, vespere interbabilado kaj projekciado el IKUE-aranĝoj.

LOĜADO en spiritekzerca domo en najbareco de la baziliko, en 1–3litaj ĉambroj (kun lavujo; duŝejoj/necesejoj surkoridore). 280,- CZK (por 1 nokto), 500,- CZ (por 2 noktoj) popersone.

Prezo de MANĜOJ: matenmanĝo 45,- CZK, tagmanĝo 90,- CZK, vespermanĝo 65,- CZK. Elkore bonvenas ankaŭ nemembroj de la sekcio! Pliaj informoj kaj aliĝiloj:

<http://www.ikue.org/cz/svatahora/svatahora.htm>.

Aliĝlimdato: 10.6.2015.

Kontaktadreso: Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice, tel.+420 732 420 675, m.svacek@seznam.cz



fotoj el Vikipedio

De Ŝumice al Nepalo



Nia tre agema kaj kuraĝa sinjorino Helena Tlachová el Ŝumice aliĝis al projekto „Ni plenumas dezirojn al maljunuloj“ kaj danke al tio vizitis fine de la pasinta jaro Nepalon, kie ŝi parolis ĉiam esperantlingve. Pri ŝia vojaĝo informis en januaro 2015 Slovácký deník (Slovakia ĵurnalo) sub titolo „Vi ne scias imagi, kia terura mizero regas en Nepalo“. Poste ŝin vizitis la televido Barrandov kaj filmis pri ŝi malgrandan videon, kiun oni elsendis la 26-an de februaro 2015.



fotoj H. Tlachová

Theodor Ĉejka sur trovitaj fotoj

D-ro Mirek Ĉejka, filo de Theodor Ĉejka, sendis al ni du fotojn de sia patro, nove trovitajn.



La 18-an de junio 1928 prezidento Masaryk venis vizite al Bystřice pod Hostýnem. Premante la manon de Th. Ĉejka, li demandis: „Ještě pořád vydáváte ty esperantské knížky?“ (Ĉu vi ankoraŭ eldonas la esperantlingvajn librojn?)



La dua bildo estis fotita la 16-an de aŭgusto 1934 ankaŭ en Bystřice, dum vizito de la lernejestro Josef Krumpholtz, kiu komence de la jarcento kunaŭtoris la unuajn lernolibrojn.

*Miroslav Malovec
(ambaŭ artikoloj)*

Jubileoj

Esperanto-klubo en Vítkovice havas tri jubileulojn: La 13-an de marto 2015 festis sian 90-jariĝon **Jindřich Legut**, la 24-an de februaro sian 70-jariĝon **Ladislav Němec** kaj la 26-an de januaro sian 60-jariĝon **Jaroslav Suchánek**.



Vlastimil Novobilský – 80

Honora membro de ĈEA, emerita profesoro kaj rektoro de universitato en Ústí nad Labem **Vlastimil Novobilský** fariĝis 80-jarulo la 15-an de februaro 2015. En Esperantujo li estas konata precipe pro siaj libroj kaj artikoloj pri literaturo (*Skizo pri la Esperanta literaturo*, *Česká literatura v esperantu*, *Komenio kaj la internacia lingvo* k.a.), pro sia traduko de taglibro de Petr Ginz, kiel rektoro de la Internacia Kongresa Universitato dum la Praga UK 1996, kiel organizanto de kulturaj festivaloj en Ústí, pro siaj okupiĝoj pri F.V.Lorenz kaj Otto Ginz (konserviĝis lia magnetofona registro de intervjuo kun O. Ginz). Ekster la movado lin konas fakuloj pri kemio kiel aŭtoron de lernolibroj kaj universitatan pedagogon. Intervujon kun prof. Novobilský alportis Starto 3/2008 (p. 90-91), lian biografion Starto 1/1997 (p. 8-9).



Komenio kaj la internacia lingvo k.a.), pro sia traduko de taglibro de Petr Ginz, kiel rektoro de la Internacia Kongresa Universitato dum la Praga UK 1996, kiel organizanto de kulturaj

festivaloj en Ústí, pro siaj okupiĝoj pri F.V.Lorenz kaj Otto Ginz (konserviĝis lia magnetofona registro de intervjuo kun O. Ginz). Ekster la movado lin konas fakuloj pri kemio kiel aŭtoron de lernolibroj kaj universitatan pedagogon. Intervujon kun prof. Novobilský alportis Starto 3/2008 (p. 90-91), lian biografion Starto 1/1997 (p. 8-9).

Monumento

Pri esperantista monumento en Zábřeh nad Odrou (Ostrava-sudo) en parko nomita laŭ skolto Milan Rotter (ekzekutita de faŝistoj) raportis en januaro 2015 gazeto Sudaj Folioj de Ostrava el plumo de historiisto Tomáš Majliš. La sama historiisto babilis antaŭ la monumento kun Jaroslav Suchánek kaj la interparolon elsendis Radio Ostrava vendrede la 27-an de februaro (ligon al la interparolo vi trovos en la retejo de Esperanto-klubo Vítkovice <http://www.esperantovitkovice.estranky.cz/>



Foto el Starto 6/1996

La monumenton aĉetis en 1934 la klubo en Bohumín, sed dum la milito ĝi malaperis el la loka parko kaj estis trovita hazarde sub la tero en 1949. Alois Kubala el Esperantista societo Komenský aranĝis transporton de la monumento al Zábřeh kaj en 1952 ĝi estis inaŭgurita omaĝe al 360 jaroj de naskiĝo de Komenský

-mm-

Petr Ginz

Princo kun flava stelo

Instruisto František Tichý el la projekto *Terezínská štafeta* (Terezina stafeto) kunlabore kun s-ino Chava Pressburger, fratino de Petr Ginz, verkis libron *Princo se žlutou hvězdou* (Princo kun flava stelo) pri la vivo de Petr, precipe en la geto de Terezín, kie li sekrete eldonadis gazeton *Vedem* (Ni venkas) kun aliaj knaboj. Petr estis filo de esperantistoj Ota kaj Marie Ginz, ankaŭ liaj geonkloj Otto kaj Božena Sklenčka estis esperantistoj, la aktoro Ota Sklenčka estis lia kuzo kaj nia asocia membro ĝis la morto.

Petro jam kiel infano pruvis eksterordinarajn talentojn, verkistan kaj pentristan, sed lian vivon ŝiris gaskameroj en Aŭŝvico kiam li estis 16-jara.

Lia nomo mondfamiĝis post la tragedio de kosmopramo Columbia la 1-an de februaro 2003, ĉar la israela kosmonaŭto Ilan Ramon kunprenis al la kosmo desegnon de Petr Ginz kiel simbolon de holokaŭsto. La bildo montras nian Teron vidatan de Luno. La mondo komencis interesiĝi, kiu estis tiu knabo de ĉeĥa juda deveno, kiu faris tiel belan desegnon.

Ĉeĥa Poŝto eldonis poŝtmarkon kun la desegno kaj portreto de Petr, lia fratino aperigis lian taglibron, kiun ni rapide esperantigis (Taglibro de mia frato), la societo Franz Kavka publikigis lian romanon *Návštěva z pravěku* (Vizito el praepoko), plurajn dokumentajn filmojn elsendis Ĉeĥa Televido. Unesko preparis filmeton kaj prospekton La lasta flugo de Petr Ginz <http://www.petrginzfilm.com/> kiu celas informi la lernejanon en la tuta mondo pri holokaŭsto.

Tamen Petr Ginz estas pli konata en eksterlando ol en Ĉeĥio. La situacion klopodas ŝanĝi la projekto Terezina stafeto per sia retejo www.petrginz.cz/, kaj per la nove eldonita libro.

La aŭtoro prezentis la libron en prelego <https://www.youtube.com/watch?v=WqVgZM31tpY>, en kiu legis la tekstojn malgranda knabo proksimume samaĝa kiel Petro, kiam li verkis tiujn tekstojn. La preleganto rakontas ankaŭ pri la gepatroj, kiuj renkontiĝis dum la praga Esperanto-kongreso 1921, opiniis unu la alian fremdulo, ĉar ili ambaŭ parolis esperantlingve, sed poste ili fariĝis kunlaborantoj pri la movado kaj fine geedzoj.

Poste estas priskribata la vivo de malgranda Petro, prezentitaj kelkaj liaj leteroj, ĝis lia 14-a jaro, kiam li ricevis ordonon forveturi al Terezín ankoraŭ en tiu vespero. Pri la knaboj tie zorgis junaj homoj kaj la knaboj tie eldonadis la jam menciitan gazeton *Vedem*, kiun oni povas legi en la Terezina retejo <http://www.vedem-terezin.cz/>. Tie vi trovos ankaŭ aliajn gazetojn de la knaboj, nome Kamarád, Domov (Hejmo) kaj Rim Rim Rim.

Miroslav Malovec



foto Terezínská štafeta

La libro *Princo kun flava stelo* en la ĉeĥa lingvo

KOMENIO - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

Ambaŭ spertis, ke unuarange gravas, ke **ĉiuj** homoj unuece akceptu la komunan religian kernon: sentu Dion en siaj koroj kaj agu laŭ Liaj instigoj en siaj Koscioj. Tiu ĉi principo trapenetas ĉiujn verkojn de Komenio kaj Zamenhof, kiu akceptis ĝin kiel bazon por sia homaranismo.

Ambaŭ rigardis necese venki la babelan konfuziĝon de lingvoj per kreo kaj ĝenerala akcepto de nova, facila, universala lingvo. Komenio precize starigis ĝiajn kriteriojn, kiujn Zamenhof – per sia Esperanto – praktike plenumis.

Ambaŭ – celante krei unuecon en diversecoj religia kaj lingva – absolute ne intencis likvidi la ekzistantajn religiojn kaj lingvojn, male ili rekonis, ke ĉiuj havas siajn gravajn specifajn valorojn eĉ futurajn misiojn.

Tamen ilia strebado pri kreo de unueca bazo spirita kaj lingva por la tuta homaro – en iliaj eĉ postaj epokoj – ne estas ĝenerale subtenata, sed grandparte rigardata, ja eĉ primokata, kiel neefektivebla utopiaĵo. Komenio dum sia tuta vivo suferis pro la religia netoleremo kaj Zamenhof pro la rasa malamo, kiuj en iliaj epokoj intense regis...

Zamenhof devis – dum la 1-a Universala Kongreso de Esperanto, en la franca urbo Boulogne-sur-Mer, en j. 1905 – eĉ mallongigi sian inaŭguran, noblan poemon «Preĝo sub la verda standardo», per ellaso de ĝia lasta strofo, kiu sonas:

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
antaŭen kun pacaj armiloj! Kristanoj,
hebreoj aŭ mahometanoj, ni ĉiuj de Di'

estas filoj. Ni ĉiam memoru pri bon' de l'
homaro kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto
kaj staro al frata la celo ni iru obstine.
Antaŭen, ĝisfine!

La homaro do ne akceptis iliajn ideojn pri la tuthomara harmonio, preferante plue droniĝi en antaŭjuĝoj, netoleremo kaj sensenca, perforta solvado de la internacia problemaro... Tial, post ilia morto, sekvis ankoraŭ pluaj militoj, oni daŭre armadas kaj la homaro konstante vivas en malakordo, nefido, necerteco, mizero... La bazaj mondproblemoj restas ĝis nun ne solvitaj...

Tamen iliaj ideoj estas konstante valoraj, kapablaj kontribui al solvado ĝuste ankaŭ de la nuna mondproblemaro. Necesas nur konstrui el ili modernan, universale akcepteblan vojon al la tuthomara harmonio. Al la tuta homaro ĝi povus esti plej bone disponigita enkadre de la jam evoluiĝanta ekumena movado, kiun necesas nur – laŭ ideoj de Komenio kaj Zamenhof – universaligi spirite kaj lingve.

En komenca stadio de la ekumena movado tio ne eblis, ĉar ĝi ekevoluadis nur en la religia sfero kristana kaj eĉ tio estis ligita kun venkado de multaj obstakloj. Nur post la historia, komuna, diversreligia preĝado por mondopaco, en la itala urbo Assisi, okazinta 27.10.1986, aperis espero, ke la ekumena movado povos inkluzivi eĉ religiojn nekristanajn.

Iniciatojn por universaligo de la tuthomara ekumena movado, cele realigi ĝin kadre de la vojo al la tuthomara harmonio – laŭ vizio de Komenio kaj Zamenhof – prezentadis la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) en sia organo PACO, konstanta rubriko «Ekumena voĉo de paco» (EVP), en jaroj 1987-1991, en diversaj artikoloj.

Iliaj ĉefaj instigoj resume:

Per la universala ekumena preĝado por mondopaco – en Assisi, 27.10.1987 – fine maturiĝis tempo por mondscale realigi la universalan edukadon por tuthomara harmonio kaj tutmonda paco, laŭ la homarana idearo de Zamenhof.

Dum la tutmondaj ekumenaj kaj interreligiaj porpacaj kongresoj, kiuj estas preparataj, kunvenos reprezentantoj de plej diversaj religiaj komunumoj – kristanaj eĉ nekristanaj – el la tuta mondo. Ili unuigu sian valoran spiritan potencialon kaj kreu komunan labor-komisionon, kiu preparos starigon de la plej supera, tutreligia mondorganizaĵo, nomota ekz. «Kosma ekumeno» aŭ «Universala ekumeno», kies membroj estus fakuloj de **ĉiuj** religiaj komunumoj.

Ĝia ĉeftasko fariĝus sistema serĉado de ĉio, kio unuopajn religiojn kunigas kaj tiamaniere kreo de unueca religia bazo, universale akceptebla. Sur ĝi povus ekzisti kaj libere evoluiĝadi la plej variaj specifajoj de ĉiuj religiaj komunumoj, kiuj ne plu kaŭzus ilian reciprokan mal-amikecon, sed servus al reciproka pliriĉigado.

Tio ebligis plenumadon de plua, grava tasko: ĝenerala konatiĝado kun moralaj, spiritaj juveloj kaj spertoj de ĉiuj religioj, kapablaj kontribuari al la tuthomara harmonio.

La «Kosma ekumeno» – mondkonsililo por unueco en diverseco religia – popularigadus rezultojn de siaj laboroj en samnoma gazeto kaj samnoma radio-disaŭdigado, tutmonde aŭdebla. Tiamaniere ĝi efike plugus sulkojn sur la – ĝis nun ne kulturita – universale ekumena kampo, por ĝia fekundigo kaj tuthomare prospera rikolto. Ĝi estus

konstanta internacia universitato de la tuthomara harmonio.

Ĝi fariĝus spirita suno, konstante disradiana harmoniigajn – Diajn – semojn de ĉiuj religioj en korojn de **ĉiuj** homoj, samtempe varmigante ilin tiel, ke la semoj povu ekĝermi, ekflori kaj doni utilajn fruktojn. Por tuthomare prospera rikolto gravas precipe tiu ĉi fundamenta semo:

Mi amas Dion, kiel misteran Patron de Universo.

Mi vivas laŭ Liaj konsiloj en mia Konscienco.

Mi agas kun ĉiu tiel, kiel mi deziras, ke oni agu kun mi.

Ĝi estas triunuo de gravaj kodoj por evoluado de fundamenta kredo, ĝusta vivo kaj ĝenerala harmonio. Ĝi fariĝus kompasoj en ni: konstanta, ĝusta vivdirektilo en sferoj globala kaj eĉ persona kaj harmoniigilo de ĉiuj vivagoj. Tial gravas, ke ĝi estu kulturata fakte en **ĉies** homaj koroj.

La agadlingvo de la «Kosma ekumeno» devus fariĝi – krom komence bezonaj lingvoj naciaj – la neŭtrala lingvo Esperanto, antaŭdestinita de ĝia aŭtoro Zamenhof, precipe por la spirita unuiĝo de la homaro. Ĝian praktikan taŭgecon pruvis jam la tutmonda – pli ol centjara – «provo per tempo», ĉefe dum la ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Spirita ano de la «Kosma ekumeno» povus fariĝi **ĉiu** homo – sen kiu ajn formala aliĝilo – legante ĝian samnoman gazeton aŭ aŭskultante ĝian samnoman radio-disaŭdigadon kaj vivante laŭ tie heroldata universala etiko.

(*daŭrigota*)

El la kluba vivo

Brno. La 4-an de februaro 2015 la kluba jarkunveno decidis krei novan modernan retejon www.esperantobrna.cz. La kurso en Masaryk-universitato finiĝis en junio 2014. Du klubanoj forpasis, du novaj aliĝis kaj tria rekotizis. La klubo kunlaboras kun rusoj en Moravio kaj juda societo en Brno. En la kluba retejo estas elŝuteblaj prelegoj kaj vortaretoj por ekzercado.

Lanškroun: Jana Křížková kunlabore kun Jan Werner prilaboris historion de EK Lanškroun.

Mladá Boleslav: Kurso en elementa lernejo daŭris ĝis junio, lingvaj seminarioj en Skokovy okazis en majo kaj septembro. En la urba biblioteko la klubo prelegis pri Islando kaj pri libro *Maskerado ĉirkaŭ morto*. En la astronomia observejo eblas mendi ĉiĉeronadon en Esperanto. Pri Esperanto mencias ankaŭ retejoj www.evinatelier.cz kaj www.labutipirka.cz. J. Drahotová enĉeĝigis libron de Vladimír Samodaj *Esperanto kaj Vivo*. Ŝiajn tradukojn trovu ĉe:

www.mlboleslav.cz/esperanto
www.bezvydavatele.cz
www.esperanto.wz.cz

Moravské Budějovice: La ĉefa atingo en 2014 estis eldono de libro de Otokar Březina *Tajemství bolesti – Mistero de doloro* kun tradukoj de Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek kaj 22 alilingvaj tradukintoj kunlabore kun Societo de Otokar Březina en Jaroměřice nad Rokytnou. La klubanoj vizitis la senaton kaj Viktor Dvořák salutis UK en Argentino en la nomo de ĈEA.

Prostějov: La 5-an de februaro 2015 partoprenis la kluban jarkunvenon sep membroj kaj du gastoj el Olomouc.



Estis elektita nova kluba komitato: prezidanto Jaroslav Liška, bibliotekisto Milan Smělý, kasisto Jiří Kincl, komitatanino Božena Danišová, revizorino Bedřiška Kaštilová. La klubaj kunvenoj ĉiun ĵaŭdon je la 16-a horo.

Písek: du kulturaj mondpremieroj. Kadre de la tradicia AnkRo (Antaŭkristnaska Renkontiĝo) 29.11.2014, kie kunvenis ĉ. 25 partoprenantoj (ne nur el Suda Bohemio), dum la 7-a kultura matineo en la Urba Biblioteko estis al la publiko unuafoje prezentita la fama poemo de Fráňa Šrámek "Písecká" paralele en la ĉeĥa kaj brila Esperanto-traduko de Jaroslav Krolupper. Plentempe partoprenis ankaŭ redaktoroj de du distriktaj ĵurnaloj, kiuj sekve mem verkis artikolojn kaj publikigis videojn pri la aranĝo. Post 22.3.2015 post la kluba jarkunveno okazis en la Memormuzeo de Heyduk unua prezento de la lasta monodramo de Ĉestmír Vidman "Karel Havlíček Borovský" en ĉeĥlingva prezento de Jan Fidel Řepa. La aranĝo okazis kadre de la oficiala kultura programo de la Regiona muzeo kaj estis kompletigita per aparta mencio pri rilato de la verko al esperantistoj.

Třebíč: Jarkunveno okazis la 7-an de marto 2015 en Kilian-domo, oni pritraktis peparon de du etapoj de la tendaro en Lančov kaj lokigon de la Kilian-heredaĵo en kazo, ke necesos vendi la domon.

Ústí nad Labem: La klubo havas 13 membrojn, kunvenas unufoje monate por ekzerci la lingvon kaj ekscii novaĵojn. Prof. V. Novobilský kompilis materiaĵojn pri F. V. Lorenz, J. Kopecká kaj J. Rada kontribuis al AEH-informilo. La klubo partoprenas en tradicia ĉe-lima renkontiĝo kun germanaj esperantistoj.

Ni kompletigu nian vortpruvizojn

vánoční pokrmy a nápoje kristnaskaj manĝoj kaj trinkaĵoj: **adventní půst** adventa fasto, **rybí polévka** fiŝsupo, **smažený kapr** fritita karmo, **bramborový salát** terpoma salato, **vánočka** kristnaska kuko, **cukroví** kristnaskaj kuketoj, **perníčky** mielkuketoj, **koření** spico: **vanilka** vanilo, **skořice** cinamo; **svařák** varmigita spicita vino, **medovina** medo, mielvino

Silvestrovské oslavy Novjara solenado: **šampaňské** ĉampano, **přípitek** tosto, **obložený chlebíček** garnita paneto, **ohňostroj** piroteknika lumludo, **novoroční předsevzetí** novjara (antaŭ) intenco zimní počasí vintra vetero:

chumelenice, **vánice** neĝblovado, **vichřice** ventego, **mráz** frosto, **sněhová vločka** neĝero, **závěj** neĝamaso, **led** glacio, **náledí** glatglacio, glatiso, **náledí na cestě** glatisa vojo, **rampouch** pendoglacio, glaciero, **jinovatka** prujno, **lavina** lavango, **tání** degelo.

zimní sporty a zábavy vintraj sportoj kaj amuz(iĝ)oj: **lyžování** skiado, **běžkovat** skikuri, **běžky** kurskioj, **sjezdování** descenda skiado, **sjezdař** descenda skianto, **sjezdovky (lyže)** descendskioj, **lyžařský areál** skiareo, **sjezdovka** descendvego, skidescendejo, **vlek** skilifto, **sedačková lanovka** seĝa telfero, **prudký svah** kruta deklivo, **zimní olympiáda** vintraj olimpikoj, **skoky na lyžích** skisaltado, **lyžařský můstek** skisaltejo, skisaltovego **bruslení** glitkurado, sketado, (1) **brusle** sketilo, **brusle (obuv)** sketbotoj, **sáňky** sledo, **boby** bobsledo, **koulování** neĝbatalo, **sněhulák** neĝhomo, **zimní rekreace** vintra refreŝiĝo, vintra feriado, **rekreační středisko** ripozcentro, **rekreační středisko (dům)** ripozdomo

zimní oblečení vintraj vestaĵoj: **pletená čepice** trikita ĉapo, **vlněná šála** lana ŝalo, **kožené rukavice** ledaj gantoj, **bunda** anorako, **kabát** jako, **kapuce** kapuĉo, **svetr** pulovero, **kozačky** botoj zabijačka porkobuĉo: **zabijačková polévka** nigra supo, **jelito** budeno, sango-kolbaso, **jitrnice** tripa kolbaso, andujo, **prejt** kolbasfarĉo, **ovar** krenporkaĵo, kapbolaĵo.

Pavla Dvořáková

Nova versio de Hron-vortaro

En la retejo <http://www.esperanto.wz.cz/> estas je dispono nova, jam 10-a versio de la vortaro de Josef Hron.

Novaj tradukoj de Jindřiška Drahotová

En la sama retejo vi trovos ankaŭ tradukojn de J. Drahotová el Esperanto en la ĉeĥan.

Nad knihou

Tvorba slov v esperantu

V loňském roce vydalo MSD (pravděpodobně Tiskové a kopírovací služby) ve spolupráci se Sdružením pro mezinárodní jazyk esperanto v Brně (SILE) knížku J. Wernera **Tvorba slov v esperantu**. Je to počín záslužný, byť však vyvolávající



nejednu otázku. Rozhodně to není čtení do postele a přečtení – ne prostudování – sto šedesáti stránek knihy zabere mnoho hodin, které jsem osobně považoval za svou povinnost věnovat tomuto dílu vzhledem k dlouholetým přátelským vztahům k autorovi. Nejsm filolog ani esperantista teoretik, který se vyžívá v jazykových otázkách, patřím mezi esperantisty jen praktikující, byť vzhledem k mému věku a stavu našeho hnutí stále sporadičtěji. A z tohoto pohledu se také k vydané knize vyjadřuji.

Autora není nutno představovat. Pominu-li jeho minulou dlouholetou aktivitu v esperantském hnutí, je již léta znám mimo jiné svými odbornými výsledky v esperantologii, zejména v oblasti odborné terminologie, ale také v jiných otázkách pravidel esperanta. Také nekompromisně vystupuje proti různým jazykovým nešvarům a prohřeškům zastává fundamentální esperanto, a to i proti některým názorům jiných významných esperantistů včetně členů Akademie esperanta, aniž by však nerespektoval vývoj jazyka a jeho modernizaci, což lze dokumentovat na řadě autorových příspěvků v časopisech a publika-

cích. A právě některé negativní jazykové projevy posledních let jej přiměly ke shrnutí do jednoho výše jmenovaného svazku a k vyjádření vlastních kritických stanovisek. Není to proto kniha objevná, nýbrž shrnující, protože problémy, kterými se zabývá, byly již v řadě případů mezi esperantisty diskutovány. Tomu odpovídá i obsah publikace.

Text má vlastně dvě vstupní části. V první je uvedena Zamenhofova základní gramatika esperanta podle Fundamento de Esperanto z r. 1905, druhá je úvodem do problematiky tvorby slov. Jsou zde vysvětleny základní pojmy a metody, a to jak na příkladech z češtiny, tak i v esperantu. Další kapitoly počínaje číslem dvě jsou pak věnovány jen esperantu. Nejdříve gramatické povaze slov, principu nutnosti a postačitelnosti a koncovkám a jejich funkcím při tvoření slov. Jsou to záležitosti známé z Plena Analiza Gramatiko, na niž se autor odvolává. Vlastní tvorbě slov jsou věnovány kapitoly pátá až čtrnáctá a je to nejsložitější část knížky. Ne vše čtenář pochopí na první přečtení a musí se proto občas vracet, protože diskutované případy na sebe navazují. Další kapitola, zabírající téměř třetinu knihy, je pro jazykového laika velmi zajímavá. V ní jsou diskutovány a případně také podrobeny kritice odchylky od Zamenhofovy jazykové normy, s nimiž se dnešní esperantista může setkat jak v odborné literatuře tak i v běžných esperantských tištěných textech. Pro mne, dlouholetého esperantistu, byly některé „modernizace“ esperanta známy, o jiných jsem se podrobněji dozvěděl až z této publikace. Pokud moje zkušenosti z jazykové praxe dovolují, v knize publikovaným závěrům zastávám stanoviska shodná s autorem.

V obsáhlém závěru autor připomíná (na 14 stránkách!) význam morfologie – nauky o tvoření slov – a shrnuje pokusy o reformy esperanta, o něž se v minulosti opakovaně, ale neúspěšně pokoušeli sami esperantisté. Cituje řadu autorů, kteří se k esperantu a jeho vývoji vyjádřili, ať už to byli sami esperantisté nebo osoby jazyk neužívající, avšak v této oblasti se orientující. S ohledem na současný stav jazyka a hnutí s esperantem spojeného je oprávněně skeptický, v budoucnost esperanta jako mezinárodního komunikačního prostředku však věří.

Poslední část knihy obsahuje překlad několika závažných materiálů z pera R. de Saussura, K. Kalocsaye a G. Waringhiena, týkajících se jazykové problematiky. A tu vyvstávají otázky, naznačené v úvodu příspěvku. Komu je vlastně kniha určena? Český text, u něhož pouze názvy kapitol jsou také v esperantu, vylučuje mimo Čechů a Slováků jiné zájemce. Sdílím skepsi autora, že současná česká či slovenská esperantská komunita sotva projeví zájem o odbornou publikaci, která nutí ke studiu a hledání odpovědi na jazykové otázky. Většinou se spokojuje s jakýms takýms stupněm ovládnutí esperanta, které dostačuje pro vzájemnou komunikaci a setkání, a to i v mezinárodním měřítku. Zbývá tak jen několik jednotlivců, kteří věnují svůj čas překládání českých textů do esperanta s malou nadějí na jejich vydání. A pak odborníci filologové, které by problematika mezinárodního jazyka zaujala. Těch bychom však napočítali na prstech jedné ruky. Takže suma sumárum, investice autora a vydavatelů vložená do této publikace se sotva vrátí alespoň

částečně a pochybuji, že ovlivní úroveň příště publikovaných esperantských textů u nás, byť je kvalitní, poučná a důkladná. A z hlediska jazykově odborného bude mít svou hodnotu, i kdyby se esperantské hnutí někdy stalo jen encyklopedickým heslem.

V. Kočvara

Jak přeložit slovo „konferenciér“

Následující řádky jsem se rozhodl napsat, jsa vyprovokován anonymním textem „Konferanseo“ v časopise STARTO č. 4/2014.

■ Název KONFERANSEO zveřejnil již K. Kraft v Česko-esperantském slovníku z roku 1998, a to spolu s dalšími synonymními výrazy: konferencisto, anoncisto, prezentisto.

■ Další název je v Seemannově Slovensko-esperantském slovníku z roku 1970: konferenciero. Ten je převzat přímo z francouzštiny i s mezinárodní příponou -er, která se často vyskytuje, ano skrytě, i v esperantu (namátkou jmenuji): *partnero, kelnero, kočero, bajadero, megero, pasaĝero, bankiero, inĝeniero, krupiero, kuriero, kondotiero, kvakero, maklero* aj. Je chybou, že z posuzovaného slova tato přípona zmizela.

■ Při volbě nového názvu je vždy nutné znát definici pojmu: Konferanciér je osoba, která uvádí jednotlivá čísla zábavního programu v kabaretu, ve varieté, na estrádě, také při určitých kulturních pořadech, např. při vyhlášení výsledků soutěží apod.

■ Podle této definice je možno považovat název „prezentisto“, uvedený v Kraftově slovníku, za uvážený a logický. Odpovídá také tvaru italskému: *presentatore*.

■ Francouzský ekvivalent *conférencière*, z něhož je převzat i výraz český, má svůj původ ve středověké latině: (přípona) *con-* a (sloveso) *ferre* (= nést). *Conferre* v latině znamená: snášet, dopravovat na jedno místo, dopravovat něco někam, novodobě: informace pro kolegy v konferenčním sále.

■ Při odvozování esperantských slov ze slov národních jazyků se zpravidla bere za základ psaná forma, nikoliv zvuková (výslovnost se často teritoriálně liší), proto je chybné transskribovat francouzskou koncovku s příponou (*-cière*) tvarem *-seo*, a to dokonce velmi nepřesně. S přepisem francouzských nosových samohlásek dostaneme přibližně: *konferansje(r)*, zakončení na *-seo* tedy neodpovídá skutečnosti, hlavně však, mizí přípona *-er*, která je charakteristická právě pro „osobu“.

■ Jméno Williama Aulda, který připustil „konferanse“ ve své učebnici *Paŝoj al plena posedo*, nemůže být bráno jako rozhodující argument. Ač si jako literát získal v hnutí významné postavení, skutečnost, že zveřejnil toto nové slova bez komentáře a diskuse k němu, nic neváží.

■ V kontextu s latinským slovesem *conferō, conferre* esperanto obsahuje příbuzné mezinárodní slovo *konfer/enc/o*, jehož kořenem je „konfer“, mezinárodní příponou „enc“ (viz PAG, § 362) a esperantskou koncovkou „o“. Je pozoruhodné, že dosud není zavedené sloveso „konfer/i“, i když je skutečně

mezinárodní ve významu „konferovat“; en: *confer*, de: *konferieren*, fr: *conférer*, it: *conferire*, cs: *konferovat* atd.

■ Podle 15. Zamenhofova pravidla (viz *Fundamento de Esperanto, Universala Gramatiko*) platí pro utváření nových slov zásada: „uzi sensanĝe nur la vorton **fundamentan** kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.“ Ono „fundametální“ slovo (Zamenhof výrazem „slovo“ víceméně laicky označoval všechny slovní prvky, morfémy – kořeny, afixy, gramatické koncovky) je v tomto případě KONFER, lexikální kořen slovesného charakteru. KONFER/ANT/O je tedy osoba, která konferuje. A je možné tomuto substantivu přidělit v druhém plánu i význam konferanciéra. Můžeme tedy zvažovat: *prezentisto*, *konferenciero* (podle Seemanna) nebo *konferanto*, v žádném případě však problematické, morfematically chybné KONFERANSEO.

Jan Werner (januaro 2015)

Poznámka redaktora:

Text v minulém čísle byl můj redaktorský článek. Bulharskou povídku *Konferanse* přijal Auld do literární přílohy revue Esperanto v roce 1961, v roce 1968 ji zařadil do své mezinárodní učebnice, kterou mu vydalo nakladatelství Heroldo de Esperanto. Vyšlo celkem 7 vydání, na druhém a třetím vydání (1970 a 1974) se podílel Český esperantský svaz se svou pedagogickou sekcí. Z vydání 1974 jsem se učil i já a samozřejmě mě ani nenapadlo zkoumat, zda některé z 1.682 nových slov není závadné, zvláště když bylo v názvu článku. Spíše mě zaráží, že se po půl století dozvídám, že jsem jediný, kdo to slovo zná. Jako by se ostatní studující podle této učebnice až do 21. lekce nedostali.

Miroslav Malovec

Skokovy

Jam la 41-a lingva seminario atendas vin en la pensio Espero en la vilaĝo Skokovy en la tagoj de la 20-a ĝis 26-a de aprilo 2015.



zveme Vás na
jarní jazykový seminář

41.

ni invitas Vin al
printempa lingva seminario

SKOKOVY
2015
20.-26.4.2015



Pro někoho už 41. esperantský seminář,
pro jiného přátelské setkání plné pohody, přátel
a hezkých chvil
ve dnech 20. až 26. dubna 2015

Pension
ESPERO

ve Skokovech v Českém ráji

Semajno en la Ĉeĥa Paradizo inter homoj, kiuj amas Esperanton kaj la naturon en la ĉirkaŭaĵo, kostas 420 Kč surloke, plus 120 Kč por la organizado.

Skribu al:

Jindřiška Drahotová
Sadová 745/36
Mladá Boleslav
293 01
720 652 320
drahotovaesperanto@seznam.cz

Somera lingva tendaro en Lančov

La 1-a etapo ne okazas

La 2-a etapo 19.7. - 1.8.2015

La 3-a etapo 2.8. - 14.8.2015

Renkontiĝo de la iamaj tendaranoj 14.8.-
16.8.2015.

Info: let.lancov@seznam.cz

tel: 604 940 663 Lenka Lacinová

Esperanto, 674 01 Třebíč

<http://set-lancov.cz>

Prezoj:

Esperanto – infanoj – 3790 Kč

Esperanto – super 15 jaroj – 3990 Kč

Aliaj lingvoj – infanoj – 4090 Kč

Aliaj lingvoj – super 15 jaroj – 4290 Kč



Vivrakonto de nia paĉjo


Karel Kraft

(★24.2.1926 – †11.1.2015)

Paĉjo naskiĝis en muelista familio en Příbram. Li ne havis gefratojn, krom frato Jiřík (Georgĉjo), mortinta pro pneŭmonito ankoraŭ kiel infano.

Kiam li studis en la realgimnazio de Příbram, venis la milito. Pro spitemo kontraŭ la protektorate deviga germana lingvo li lernis aŭtodidakte la anglan, francan kaj ankaŭ la rusan kun hejme kaŝata fuĝinta rusa prizonulo. Antaŭ la fino de la milito anstataŭ prepari sin por la abiturienta ekzameno li devis laŭordone labori por la germanoj. Abiturientiĝi li povis nur post la milito.

Antaŭe en majo 1945 li sekrete transkondukis germanan dizertinton al ties hejmo en Bavario.



De tie trans okupaciataj zonoj en Germanio, sopirante pri aventuro, li atingis Francion. Sed ĉar li ne posedis ĉe si

postulatan finanĉan sumon, li baldaŭ estis enprizonigita kiel vagulo kaj poste kune kun eksaj koncentrejanoj repatriigita reen al Ĉeĥoslovakio.

Sopiro ekkoni la mondon kaj scio pri militaj kaj postmilitaj kruelaĵoj venigis lin al serĉado de humanismaj celoj. Li interesiĝis pri hinduismo kaj aliaj orientaj filozofioj, kiuj metis lin sur la vojon de vegetarismo, kio por multaj estis eble nur konduto de strangulo, sed por paĉjo ĝi estis afero esenca.

Plie li komencis lerni Esperanton, lingvon malkonstruantan murojn inter la nacioj. Al la esperantista movado li restis fidela dum la tuta vivo kaj dediĉis al ĝi

nekredeblajn energion kaj tempon. Li korespondis kun amikoj-esperantistoj el la tuta mondo.

Vizitadis lin nederlandanoj, li verkis por la esperantlingvaj elsendoj de la pola radio, por la japanaj gazetoj, al kuracistoj en Ĉinio li sendadis vinberan sukeron, tie mankantan, kaj ankaŭ informojn por ilia teatro „Signala lumo”, laŭ modelo de la ĉeĥa teatro Semafor de Suchý kaj Šlitr.

En la profesia sfero kiel ĵusa abituriento li trapasis instruistan kurson kaj fariĝis edukisto. Kiam li estris en 1948 resanigan restadon de infanoj trafitaj de la milito en Pec pod Sněžkou, li konatiĝis kun sia estonta edzino, kiu ĝi tie plenumis praktikadon kiel kuiristino post fino de familia lernejo.

Fine de 1948 li rekrutiĝis por dujara soldata servo. Reveninte en la civilan vivon li fariĝis instruisto en Hříměždice kaj en 1950 li edziĝis al sia viv-amatino.

En 1951 li venis al Rosovice kiel lernejestro, kie al li en 1952 naskiĝis filo en la sama tago, en kiu mortis la angla reĝo Georgo. Ekde 1953 li instruis ĉe unuklasa lernejo en Županovice ĝis inundo en 1955. Županovice al li plaĉis, en 1957 li aĉetis parcelon kun argila dometo kaj komencis konstrui kabanon.

Post certa tempo li rekonstruis ĝin al domo kaj en la 1970-aj jaroj li enloĝiĝis. Kun la lokaj fajrobrigadistoj li travivis tiutempe kutiman riĉan vilaĝan vivon.

Post inundo de digolago Slapy li estis translokita kiel lernejestro al Obořiště, kie naskiĝis filino Hana. Li komencis telestudi psihopedion, nun nomatan speciala pedagogio, kaj transiris kiel edukisto al reedukado en Obořiště.

Por sia vivofilozofio kaj pedagogia laboro li ne renkontis komprenon ĉe siaj superuloj kaj politikaj funkciuloj.




Pro tio li foriris instrui al lernejo en Dobříš. Ĉi tie li daŭrigis organizaĉon de ekskursoj laŭ skolta modelo. Sed ne longe.

Komence de la "re-normaligo", la 28-an de novembro 1969, li estis elĵetita el la elementa lernejo en Dobříš, precipe pro sia aktivado en poste malpermesita Societo por Homaj Rajtoj kaj pro spitado kontraŭ nemoralaj praktikoj post la sovetia okupacio.

Li komencis labori kiel helpa laboristo en uraniaj minejoj de Příbram, kaj kiam aperis ŝanco de pli alta salajro, li foriris labori kiel bagristo ĉe konstruado de alkonduka akva kanalo Ŝelivka. Poste li estis ŝoforo ĉe aŭtomobila fako de elektrodistribua entrepreno. Fine li emeritiĝis en agrikultura konstru-entrepreno kiel majstro de drenado – tiun laboron kun ciganoj li ŝate rememoradis ŝercante, ke ĉi tie li havis la plej bonajn pedagogiajn rezultojn.

Lia sopiro denove instrui en lernejo plenumiĝis nur la 28-an de novembro 1989, precize samtage post dudek jaroj. Politike antaŭvidemaj distriktaj funkcioj akceptis lin por la "malnova" lernejo en Dobříš, kie li finis sian lastan instruaron. Poste li ankoraŭ helpis en lernejo de Borotice instrui informadikon, matematikon kaj la anglan.

Neniam lin forlasis aktiva vigleco kaj emo transdoni sciojn. Ekde 1988 li laboris kun kunlaborantoj pri la nova Esperanto-vortaro por la Ŝtata Pedagogia Eldonejo. Post la poli-




tikaj ŝanĝoj la eldonejo malaperis kaj esperantistoj decis eldoni memhelpe la Esperantan-ĉeĥan vortaron en 1995 kaj al paĉjo ili konfidis la definitivan redaktadon. Kun helpo de la familio li kompilis la plej ampleksan ĉeĥan-Esperantan vortaron, kiu aperis en 1998.

Poste li verkis ankoraŭ kelkajn familiajn rakontojn kaj pluajn librojn inkluzive de tradukoj. La plej grava estis esperantlingva libro pri Přemysl Pitter „Heroo de amo”.

Eldonisto, sinjoro Petr Chrdle, pri la libro skribis:

„Ĝi estas biografio de homo, kiu dediĉis sian vivon al laboro por infanoj kaj junularo de malriĉaj societaj tavoloj. Tuj post la 2-a mondmilito li kuraĝis kontraŭstari maljustaĵojn faratajn kontraŭ germanaj kaj judaj infanoj. Post la bolŝevista puĉo li devis forlasi sian patrujon kaj ĝis la vivofino li helpis rifuĝintojn el la sovetia bloko.”



Paĉjo konatiĝis kun laika predikisto kaj edukisto Přemysl Pitter jam fine de la 1940-aj jaroj kaj ili amikiĝis. Al Přemysl Pitter minacis malliberigo, tial li elmigris al Svislando

kaj ne povis plenumi sian promeson, ke li fariĝos baptopatro por la atendata ido de paĉjo. Ilia amikeco daŭris plu dum jaroj, kvankam nur perletere.

La agado de Přemysl Pitter kaj de liaj kunlaborantoj tiom influis paĉjon, ke en esperantistaj kaj lernejoj someraj tendaroj, kiujn li ofte organizis, per diversaj formoj li malkaŝis al la junularo ankaŭ aliajn verojn ol la oficialajn.

Ni dankas vin, paĉjo, ke vi montris al ni la vojon, kiel ne cedi al fundamentistaj ideologioj kaj kiel gravas solidareco, toleremo kaj serĉado ...

*En Županovice,
la 17-an de januaro 2015,
Jiří Kraft*



foto el arkivo de Karel Kraft

Infanoj savitaj de Přemysl Pitter renkontiĝis en la jaro 2006 en Štířín, plej multaj venis el Izraelo. Karel Kraft sidas meze.

Rimarkigo de la redaktoro: En Starto jam aperis de Karel Kraft aŭ pri li: Ĉu ĉeĥe aŭ verde? (4/1970), Lerni el siaj propraj mankoj (2/1972), Ni kreu organizon kun altaj pretendoj – la organizo kreas nin! (3-4/1972), Jakobo ne ŝatas fabelojn (5/1973), Karel Kraft 60-jara (1/1986), Novaj honoraj membroj (3/1997), Rudolf Štursa, savanto de judoj (1/2006), Intervjuo kun Karel Kraft (4/2007).

Rimarkigo 2:

Ĉe la funebra ceremonio en la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio adiaŭis s-anon Karel Kraft honora membrino de ĈEA Margit Turková per florbukedo.

Rememoroj pri Karel Kraft


Kun Karel Kraft mi konatiĝis persone nur kiel ekzamenato dum la asocia ekzameno pri la kapablo instrui. Li estis ekzamenanto en la fako pedagogio kaj li aspektis el ĉiuj komisionanoj plej severe kaj timige. Tiutempe mi ne estus kredinta, ke mi povus ofte kunlabori kaj eĉ proksime amikiĝi kun li.

La dua kontakto estis, kiam li ekaperis en la oficejo de ĈEA en Jilská 10 (kie mi, tiam ĈEA-prezidanto, estis kune kun la sekretario Zdeněk Pluhař) kaj anoncis, ke li ne plu volas esti komitatano de Sciencteknika Sekcio kaj ne povas trovi anstataŭiganton, kaj petis nin iun trovi. Tiam ni la unuan fojon babilis kaj mi eksciis iom detale pri la granda projekto, al kiu li volas komplete dediĉi sin: la granda ĉeĥa-esperanta kaj esperanta-ĉeĥa vortaro.

La laboro de la vortaristoj precipe je la Esperanta-ĉeĥa vortaro kontentige progresis, sed evidentiĝis, ke ambaŭ eldonejoj, kiuj promesis ĝin eldoni, retiriĝis: unue Ŝtata Pedagogia Eldonejo, sekve ankaŭ Ivo Železný, esperantisto kaj tiam la plej granda ĉeĥa eldonisto. Kaj mi diris iom ŝerce, se ne kuraĝas ĝin eldoni la plej renoma ĉeĥa eldonejo, do eble eldonos ĝin mi, komencanta eldonisto.

Post iom da tempo Karel (tiutempe por mi ankoraŭ sinjoro Kraft) rememorigis tion al mi menciante, ke la esperanta-ĉeĥa parto estos baldaŭ redakte eldonpreta. Ni interkonsentis, ke la reala nombro estu 3000 ekzempleroj. Mi devis havi la kondiĉon, ke li senpage kompostu la vortaron kaj ke li uzu la programon WordPerfekt por tio (kiun mi uzadis por miaj eldonaĵoj), kaj li foriris kun la vortoj, ke li tion provos. Kaj efektive:

Lia filo provizis lin per komputilo kaj programo, kaj Karel komencis lerni komputiladon kaj enpaĝigi librojn – kaj komencis tuj per unu el la plej komplika formo, nome kompostado de la vortaro! En tiu tempo ni ofte renkontiĝis kaj konzultis la teknikan flankon, kvankam mi mem ne estis multe pli sperta pri tio. Kaj mi tre admiris, ke li sukcesis vere la tutan vortaron prepari por la preso!



Nun do estis mi, kiu devis plenumi la promeson kaj eldoni la vortaron, sed mi ne havis sufiĉe altan monkapitalon. Mi vane serĉis sponsorojn, kiuj iel kontribuas, tamen finfine ni interkonsentis kun la komitato de ĈEA, ke ĈEA helpos, aĉetante kontraŭ produktoprezo parton de la eldonkvanto. Ĉar ankoraŭ iom mankis, Karel ne nur faris grandiozan laboron, sed eĉ helpis finance, same aĉetante parton de la eldonitaj vortaroj.

La situacio ripetiĝis ĉe la eldono de la ĉeĥa-esperanta vortaro, kiun Karel jam kompostis en Word, kion mi akceptis. Sed tio ne estis fino de nia kunlaboro. Jam tiam ni ofte parolis pri la amiko de Karel, Přemysl Pitter, pri kies vivo Karel tiutempe komencis verki libron. Mi devas konfesi, ke la nomon Pitter mi antaŭe neniam aŭdis, sed mi entuziasmiĝis pri li kaj lia agado. Kiam Karel demandis, ĉu mi ankaŭ ĝin eldonu, mi volonte konsentis. Sed kiam alproksimiĝis la da-

to de la eldono, la situacio terure ŝanĝiĝis, ĉar la inundo en la jaro 2002 subakvigis ne nur mian neasekurigitan stokojon; mi perdis ne nur preskaŭ ĉiujn librojn produktitaj, sed ankaŭ ekipaĵojn ktp.; apenaŭ mi sukcesis savi mian eldonejon helpe de malavaraj donacoj de miaj Esperanto-amikoj. Plue, post mona elĉerpiĝo pro la eldono de Ŝvejk en Esperanto, preparita jam antaŭ la inundo, mi restis praktike senmona. Tiam Karel venis kun la informo, ke lia filo Jiří pretas pagi la tutan koston de la produkto kaj tio ankaŭ okazis. Do kvankam la libro estas eldonita de mia eldonejo, fakte la tuta stoko estis posedaĵo de Karel, de kiu mi sinsekve aĉetadis laŭ miaj ebloj malgrandajn kvantojn da ekzempleroj, kiujn mi pluvendadis kiel mian eldonaĵon.

Kaj ne nur nia amikeco, ankaŭ nia kunlaboro plu kontinuas. Finfine mi havis la ŝancon oferti al Karel ankaŭ honorariatan laboron, nome traduki el Esperanto ĉeĥen la libron Baza Instruo de Ŭonbulismo, kiun mi sekve eldonis dulingve, ĉeĥe kaj koree – la tradukon pagis Korea Asocio de Ŭonbulismo. Karel, kiu ĉiam okupiĝis ankaŭ pri aziaj filozofioj kaj religioj, estis efektive la plej bona elekto – ne nur pro amikeco, sed pro lia kompetenteco lingva kaj faka.

Multe da tempo Karel Kraft estadis ĉe mi laborante, sed ankaŭ amike babilante pri ĉio ebla: Esperanto, religioj, Pitter, historio, situacio post la milito kaj post la komunisma puĉo, vegetarismo, politiko ... – kaj li restos por ĉiam en miaj rememoroj kiel la plej laborema kaj insistema homo kun firmaj pozitivaj konvinkoj.

Dankon, Karel, por ĉio, kion mi povis lerni de vi.

Petro Chrdle

KALENDARO 2015

2015-03-15 Jarkunveno de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio en Prago

Info: cefea@centrum.cz

2015-03-20/22 La 7-a BIERo en Pelhřimov
Info: e-mentalprago@seznam.cz

2015-04-20/26 La 41-a Lingva Seminario en Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz

2015-04-23/26 La 10-a Sabla Printempo en Skokovy
Info: pavla.dvorakova@esperanto.cz

2015-04-24/26 Junulara CENTREJO en Svitavy
Info: cxej@esperanto.cz

2015-04-25 Regiona renkontiĝo en Moravská Třebová kaj Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

2015-04-28 Renkontiĝo en Pacov
Info: zemamka@seznam.cz

2015-05-16 Tradicia printempa renkontiĝo en Šumperk
Info: sumperk@esperanto.cz

2015-06-14 Renkontiĝo je Ĉantorio
Info: suchanekj@seznam.cz

2015-06-19 Muzea nokto en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz

2015-06-26/28 Renkontiĝo de Katolika Sekcio de ĈEA en Svatá Hora u Příbrami.

Info: m.svacek@seznam.cz

2015-07-19/08-01 Somera Esperanto-Tendaro en Lančov
Info: info@lancov.cz

2015-07-24-08/02 Busekskurso de AEH al la 100-a UKo en Lille

Info: aeH@esperanto-aeH.eu

2015-08-02/14 Somera Esperanto-Tendaro en Lančov
Info: info@lancov.cz

2015-08-14/16 18-a Renkonto de ekstendaranoj (de SET) en Lančov

Info: esperanto.trebic@volny.cz

2015-08-17/21 Urba lingvotendaro en Esperanto-Muzeo en Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

2015-09-05 La 9-a Postferia renkontiĝo en Netolice
Info: pisek@esperanto.cz

2015-09-26/27 "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" - inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

2015-10-01/04 La 4-a Internacia Esperanta Lernejo en Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

2015-11-06/08 Kultura Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Info: cea@esperanto.cz

2015-12-05 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek
Info: pisek@esperanto.cz

2015-12-06 La 8-a Marcipana Kristnasko en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz

MIGRA EKSPozICIO "ĈU ESPERANTO ESTAS MORTA LINGVO?"

en printempo 2015

Marto: Pardubice (Regiona Biblioteko)

Majo: Pacov (Kastela kapelo)

Junio: Sušice (Muzeo de Ŝumava)

GRAVAJ ARANĜOJ EKSTERLANDE

2015-05-22/25 92-a Germana Esperanto-Kongreso en Hameln

Info: gek15@esperanto.de

2015-07-11/19 Somera Esperanto-Studado en Martin (Slovakio)

Info: ses@ikso.net

2015-07-25/08-01 La 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lille (Francio)

Info: lille2015@lille2015.fr

2015-08-01/08 Postkongresa Internacia Kultur-Turisma Semajno en Herzberg am Harz (Germanio)
Info: esperanto-zentrum@web.de

2015-08-01/08 La 21-a Ekumena Kongreso en Strasburgo (Francio)

Info: philippe.cousson@sfr.fr

2015-08-08/15 La 88-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda

en Nitra (Slovakio) Info: sat2015@ikso.net

Greziljono

2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut - gresillon.org/printempas

2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

gresillon.org/printempas

2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - gresillon.org/s2

Jara agendo/kalendaro en gresillon.org/agendo

NI KONDOLENCAS

■ la 10-an de decembro 2014, en aĝo de 92 jaroj, finis sian vivovoĵon nia kara samideano **František Strumínský**. Devenante el Silezio li tamen travivis multajn jartojn ĉe sia koramikino Františka Víšková en Lešany, distr. Benešov. Mi rememoras nian hazardan renkontiĝon en la jaro 1983. Ni ambaŭ portis E-blazonon kaj danke al tio ni rimarkis unu la alian en la urbo Benešov. Sekvis nur malgranda paŝo por fondi lokan E-grupon en Benešov. Post morto de Františka Víšková li revenis al Havířov. Siajn lastajn jarojn, grave malsana, li travivis en pensiula hejmo en Dobrá Voda apud České Budějovice proksime ĉe siaj familianoj. Rememoras lin kore Václav Stibůrek



■ la 24-an de decembro 2014 mortis en Berlino s-ro **Dieter Berndt** nomata Ĉenda. Li naskiĝis en Ĉeĥoslovakio, parolis la ĉeĥan kiel denaskulo, helpis organizi somerajn Esperanto-tendarojn en Lančov, tradukis el la ĉeĥa rakontojn de Otakar Batlička (por la gazeto *Juna amiko*) kaj romanon de Jaroslav Foglar *La knaboj de la Kastora Rivero*.



■ la 6-an de januaro 2015 forpasis sinjorino **Jarmila Handlová** el Brno (nask. 1926). Ŝi lernis Esperanton en 1952 en tramklubo Brno, gvidata de Hugo Slavík, poste ŝi laboris en la fabriko Zetor (produktas traktorojn) kaj en emeriteco ŝi vojaĝis uzante Esperanton, plej ofte ŝi rememoris Japanion kaj Aŭstralion (UK 1997 Adelajdo).



■ la 4-an de februaro 2015 mortis en malsanulejo **Gustav Heczko** (67-jara), ano de E-klubo en Ostrava-Vítkovice



La 7-an de februaro 2015 forpasis sino Milada Mikolajková (81-jara) el Ostrava-Poruba.

La 10-an de februaro 2015 mortis Karel Krejčí el Staré Vožice (90-jara).

Kep Enderby


UEA funebras sian eksan prezidanton (1998-2001) **Kep Enderby**, kiu forpasis la 8-an de januaro 2015 en la aĝo de 88 jaroj. Li naskiĝis la 25-an de junio 1926. Li estis aŭstralia juristo, ministro pri produktado kaj justeco, juĝisto de Supera Kortumo. Esperanton li lernis en 1987, elstariĝis per siaj prelegoj.



Hans Bakker

La 21-an de januaro 2015 forpasis en Amsterdamo Honora Membro de UEA **Hans Bakker**. Li naskiĝis la 8-an de novembro 1937.

Unikan lokon en la historio de Esperanto Hans Bakker havas pro sia laboro por la **afrika agado** de UEA, kiun li gvidis de 1980 ĝis 2001. Li sciis kolekti ĉirkaŭ si reton de entuziasmaj kunlaborantoj, kiuj persone gvidis la lingvolernadon de afrikanoj. Li kreis ankaŭ vastan reton de amikoj de Afriko, kiuj per siaj donacoj ebligis la sendadon de lerniloj kaj ĉiaspecaj aliaj materialoj bezonataj de lokaj kluboj kaj landaj asocioj, kiuj komencis naskiĝi en rapida ritmo.



Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Pozor!

Změna předplatného časopisů!

Vzhledem k navýšení cen vydavateli a změně kursu koruny došlo k úpravě předplatného.

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1280,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 720,-Kč

La Gazeto: 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.

Juna Amiko: 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Femina: 870,- Kč (*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Heroldo de Esperanto: 1330,- Kč (*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého
esperantského svazu - 46. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,**

vratislav.hirs@esperanto.cz,

tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2015

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 46-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
7.5.2015**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Premio Cigno por slovakiaj esperantistoj

Okaze de la lasta disdono de Premio Cigno, la estraro decidis premii Slovakian Esperantan Federacion, kiu modele informadis diverskanale la slovakanojn pri la Esperanto-movado.

*Ayako Kawakita
Fondaĵo Cigno
Prezidanto*

Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto

Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds,
Svislando

la 13-an ĝis 16-a de majo 2015

13 prelegantoj el 11 landoj

Inter ili 3 akademianoj

Plej bunta kaj riĉa programo pretas.

www.ilei-mondo.info/ttk/



Sinjorino Helena Tlachová en Nepalo



Pavel Polnický en Meksikio



Silvestro en Česká Třebová
– konkurso pri okulvitroj



Decembraj tabloludoj en la muzeo



Marcipana Kristnasko en la muzeo



Filmado en la muzeo
fotis L. Dvořáková